# Ŝĉecina Esperanta Printempo 2015

*„Ŝĉecino - malnova havenurbo”*

*17-18-19 de aprilo 2015*

## Invitilo

Karaj geamikoj,

jam duan fojon ni deziras inviti Vin al nia printempa esperanta aranĝo. Pasintan jaron ĝia gvidtemo estis „Subtera Ŝĉecino”, ĉi-jare ni volas montri nian urbon de tute alia direkto – la direkto de akvo.



Multaj Esperantistoj opiniis, ke la pasintjara ŜEP daŭris tro mallonge. Pro tio ni decidis modifi ĝin de unutaga renkontiĝo al semajnfina aranĝo. Tiu ĉi ŝanĝo rezultigis abunde pli riĉan programon.

**Vendredo 17 de Aprilo 2015**



Ni volus komenci kun muzikkoncerto en novkonstruita, vere rimarkinda, koncertejo de Ŝĉecina Filharmonio.

*La novan konstruaĵon projektis Barcelona dueto **Barozzi – Veiga**, kaj ilia projekto atingis finalon en Eŭropa arkitekta konkurso **Mies van der Rohe Award**, kiu okazas ĉiudujare. Krom la senduba arkitektura impreso, tie atendos Vin ankaŭ muzikajn emociojn dank'al koncerto **Symfonio n-ro 7 E-dur de Anton Brucner** sub la gvidado de fama dirigento **Maestro Malcew.***

Ni renkontiĝos je la **18:30 horo** en fojero de la koncertejo, ĉe la strato Małopolska 48. La vendreda koncerto ne estas inkluziva de la aliĝpago, do oni devas aparte pagi por la bileto 20 zł aŭ 5 EUR. Se vi deziras partopreni an la koncerto bonvolu informi nin ĝis la 3-a de Aprilo 2015 ĉar nombro de lokoj estas limigita.

## Sabato 18 de Aprilo 2015




**10:00** – Komuna matenmanĝo kaj oficiala malfermo de la aranĝo en restoracio "Zamkowa" str. Rycerska 3,

*Restoracio „Zamkowa" (Kastela) estas situita en Kastelo de Pomeriaj Princoj.*



**11:00** – Promenado laŭ Aleo de Velŝipistoj,

*Reprezenta ĉerivera bulvardo de Longa Ponto ĝis Kastela Vojo, dediĉita al ĉiuj homoj ligitaj kun maro. Ĉi tie ofte albordiĝas interesaj velŝipoj kaj forveturas ekskursaj ŝipoj.*



**12:00** – Ŝipvojaĝo tra rivero Odra

*Dum la vojaĝo oni povas rigardi kaj ekscii pri multaj malnovaj kaj nuntempaj partoj de ŝĉecina haveno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La havena komplekso ŝanĝadis tre ofte dum multaj jarcentoj de ĝia funkciado kaj plenan informon pri ekskursaj vidindaĵoj vi trovos en nia informilo.*



**13:00** – Vizitado de Remparoj de Chrobry kaj Kastelo de Pomeriaj Princoj.

*Remparoj de Chrobry (Bolesław Chrobry estis unua pola reĝo kaj aligis Pomerion al Pollando en XI-a jarcento ) estas la plej fama kaj rekonebla urboarkitektaĵo en Ŝĉecino, kiu konsistas el grupo de konstruaĵoj situitaj sur eskarpo ĉe la bordo de rivero Odra.*



*Proksime de Remparoj de Chrobry situas Kastelo de Pomeriaj Princoj.*
*Ĝi estis multfoje rekonstruata ekde sia unua fondo en 1346 jaro. Post II-a mondmilito, detruita de aviadila bombado estis denove rekonstruita al nuntempa aspekto. En la Kastelo troviĝas multaj muzeoj, ekspozicioj, operejo kaj kompreneble nia restoracio ☺.*



**15:00** – Tagmanĝo en restoracio "Zamkowa"



**17:00** – Prelego de Andrzej Broda - **Ĉu Esperanto estas simpla kaj facila?**

*Oni ofte asertas, ke Esperanto estas simpla kaj regula lingvo, kaj pro tio facile lernebla. Multaj esperantistoj volas per siaj spertoj atesti, ke ili atingis fluan lingvokonon en Esperanto pli rapide ol en aliaj lingvoj. Aliflanke multaj lingvistoj diras, ke ĉiuj lingvoj estas same komplikaj. Ni rigardu la demandon el kelkaj, diversaj perspektivoj.*



**18:00** - Internacia Turniro de Kalemburoj



**19:00** – Babilado

## Dimanĉo 19 de Aprilo 2015



10:00 - Komuna matenmanĝo en restoracio "Zamkowa"



**11:30** – Vizitado de Katedralo kaj Placo de Blanka Aglo.

*Ŝĉecina Katedralo estis fondita en 1187 jaro kaj terure detruita dum II-a mondmilito. Post rekonstruaĵo ĝi estas la ununura katedralo en la mondo, kiu posedas lifton al teraso ĉe la pinto de la turo (alteco de turo 110 metroj!, taraso situas je 53 m).*
*De tie oni povas admiri panoramon de apudrivera parto de urbo.*



*Placo de Blanka Aglo (antaŭa Ĉevala Foiro) kun fontano el XVIII-a jarcento en la centro estas ĉirkaŭita per malnovaj restaurigitaj palacoj de riĉaj ŝĉecinaj familioj, ekzemple Palaco Sub Globuso, Palaco de Velthusen kaj aliaj.*




**12:30** – Cukier Lukier (Sukero Glaceigsukero),

*Komuna fabrikado de Esperantaj lekaĵoj - dolĉaj memoraĵoj de ŜEP 2015!*

## Tranoktado

Ekzemplaj ofertoj de kelkaj hoteloj.



**Campanile** – str. Wyszyńskiego 30, +48 91 481 77 00

109 zł se vi mendos interrete.

**Elka Sen** – str. 3 Maja 1a, tel. + 48 91 433 56 04

120 zł por 1-persona ĉambro

150 zł – dupersona ĉambro

160 zł – tripersona ĉambro

mendu je signalo „**Esperanto**”

**Hostel Firlik** str. Firlika 43 (signalo Esperanto) tel. +48 91 428 23 24

rekta tramo nr 6 de stacidomo

79 zł por 1-persona ĉambro (sen banejo)

105 por 1-persona ĉambro kun banejo

89 zł por 2-persona ĉambro (sen banejo)

110 zł 2-persona ĉambro kun banejo

105 zł por 3-persona ĉambro (sen banejo)

150 zł 3-persona ĉambro kun banejo

120 zł por 4-persona ĉambro (sen banejo)

160 zł 4-persona ĉambro kun banejo

City Hostel – str. Jana Kazimierza 14

Samaj loĝ' kaj prezkondiĉoj nur iomete pli malproksime de tramo.

**Atento! Ne mendu matenmanĝojn, ĉar ni matenmanĝos kune.**

Ĉiuj tiuj lokoj troviĝas proksime de urbocentro, stacidomo. kaj Kastelo de Pomeriaj Princoj kie okazos nia renkontĝo.

Se vi bezonas helpon en kontakto kun hoteloj bv informu nin. Ni volonte helpos :)

Ni petas laŭeble konfirmi vian alvenon je aldonita aliĝilo, je la adreso de Kris ĝis la 31a de marto 2015. Pagi oni povas per konto (numeron ni sendos rete) aŭ surloke.
Niaj adresoj kaj telefonoj:
Kris – Krzysztof Łobacz tel. +48 601 725 335, lobacz.k@onet.eu
Zibi - Zbigniew Matczak Tel.+48 601 71 32 94 zmatczak@poczta.onet.pl
Irena -+48 502 327 701 irena-tomaszewska@02.pl

**Kotizoj** – Aliĝilo kun vendreda koncerto 150 zł aŭ 40 euro
Aliĝilo sen vendreda koncerto 130 zł aŭ 35 euro
Kotizoj inkludas: matenmanĝojn, tagmanĝon, trinkaĵojn, biletojn, aranĝkostojn.

Ni jam ĝojas je nia baldaŭa renkonto, komuna kunlaboro kaj amuzado.

Nia retpaĝo : www.esperanto.szczecin.pl

# Aliĝilo

Jes, mi aliĝas al ŜEP 2015 en Ŝĉecino (Pollando).

Familia Nomo…………………………………………………… Persona Nomo ……………………………………………

Naskiĝdato: (jaro-monato-tago) ☐☐☐☐ ☐☐ ☐☐ VIRO ☐ /VIRINO ☐

ADRESO: Lando:……………………………. Poŝtkodo ………………… Urbo:……………………………………………

Strato kun domnumero …………………………………………………………………………………………………….

Poŝtelefono: ……………………………………… Retadreso: ………………………………………………………………

Mi preferas pagi la kotizon per: ĝirado ☐ / surloke ☐

Mi pagas :

☐ Kun vendreda koncerto en Filharmonio 150 pln /40 euro

☐ Nur aliĝkotizoj sen koncerto 130 pln /35 euro

Mi deziras mendi ĉambon en hotelo: unupersona ☐ / dupersona ☐ (pago surloke)

Mi estas vegetariano ☐ / vegano ☐

Ceteraj deziroj, rimarkoj, proponoj: ……………………………………………………………………………………….

…………………………………………………………………………………………………………………………………….

…………………………………………………………………………………………………………………………………….

Dato: ……………………………… Subskribo: ……………………………………………….